

# KITANO


numero 148 (1995:4)

De Brazilo (Brazilo) al Brazilo (Brazilo)  
Kielaj temoj en Interlingva Mondo

## AIDOSO

Rifuĝo en malkonon

- La brazila "bovamuzego" kaj aliaj:  
**KIAM HOMARO NE EVOLUAS**
- Ni eksciu...  
**POR KIO UTILAS TABAKO?**
- Nebulas la limoj, kiam temas pri  
**TOLEREMO**



**DISNEY**

La nova generacio de animitaj filmoj



Kiam homaro ne evoluas	Hilarina Aires, Brazilo	2
La heliko kaj la antilopo	Kizeiydioko Mayinda, Zairio	3
De Blua Urbo al obo	Sabira Ståhlberg, Germanio	4
Koncize pri la mongola kulturo	Ĉimidijin Dogsuren, Mongolio	6
Modela UN-sembleo en Esperanto	S. Ralf Gion Fröhlich, Svedio	7
La "interkona" mnemoniko	Detlef Meier, Germanio	7
Krucvorto	Claus Günkel, Germanio	8
Aidoso: rifuĝo en malkonon	Dorothy Blake (el UNESCO SOURCES)	8
KONTAKTO-abonkonkurso		9
La bona ingo		9
Por kio utilas tabako?	Alberto García Fumero, Kubo	10
Testudo en Spiritlando	Ōshō-Davies Olúwábúnmi, Niĝerio	10
Toleremo — ĝis kiuj limoj?	Ana Montesinos, Britio	11
Propagando bezonas propagandon	May Bijleveld, Brazilo	12
Je ekzameno sen timotremo	trad. Zoran Ĉirić, Serbio	12
La novaj Disney-filmoj	Irina Aleksejeva, Rusio	13
Preskaŭ fratoj	Joĉo Truong, Usono	14
Tentaklo		15
Ŝtupo	Valentin Katajev, trad. Andrei Kolganov, Uzbekio	15
Vi	Enkela Xhamaj, Albanio	16

## KONTAKTO

Dumona socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 148 (1995:4), 32-a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (voĉlegata por blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176  
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;  
☎ +31 10 436 10 44;  
✉ fakso +31 10 436 17 51  
e-poŝto: uea@inter.nl.net

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Irina Aleksejeva (Rusio)  
Felip Artero i Lozano (Katalunio)  
Martin Burkert (Germanio)  
Zoran Ĉirić (Serbio)  
S. Ralf Gion Fröhlich (Svedio)  
Alberto García Fumero (Kubo)  
Bernard Golden (Hungario)  
Claus Günkel (Germanio)  
Ludmila kaj Piotr Malicyj (Pollando)  
Kizeiydioko Mayinda (Zairio)  
Atilio Orellana Rojas (Argentino)  
Ōshō-Davies Olúwábúnmi (Niĝerio)  
Anna Rachoń (Pollando)  
Cláudio Rodrigues Pistilli (Brazilo)  
Ilkka Santtila (Finnlando)  
Sabira Ståhlberg (Germanio)  
Jozef Truong (Usono)

Grafika elpretigo: Roy McCoy


Provlegado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facilingvaj artikoloj estas verkitaĵoj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare.

Anoncarifoj:

Tutpaĝa 780 gld., duonpaĝa 430 gld., kvaronpaĝa 240 gld., sesonpaĝa 185 gld., okonpaĝa 130 gld. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonceto!) en sinekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la koncerna anonco. La abontarifo varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.



## enkonduko

Ĉu denove blua numero???

En la pasinta numero ni aperigis la simbolon de la 50-jariĝo de UN subskribinte kontrakton, kiu devigis nin obserbi la precizan helbluon de UN. Kaj nun la ĉef-artikolo postulas bluan — ne nur pro ĝia fona fotego kun granda ĉielo kaj bluegaj kupoloj. Ankaŭ la dorskovrilaj fotoj montras ĉielon kaj sugestas maron. Do, re-foje bluo... malhela tamen ĉi-foje!

"KONTAKTO estas unu el malmultaj Esperanto-gazetoj, kiujn oni povas montri al la ekstera publiko. Ĝi devus esti eĉ pli dika kaj magazineca!" Tiel diris d-ro Detlev Blanke en kunsido de la Komitato de UEA en Tampere. Ni ĉiuj rajtas iom fieri pri tia juĝo, ĉar onidire la Komitato kutime kontentas pri nenio...

Kvankam du numeroj de KONTAKTO ankoraŭ venos ĉi-jare, jam temp' está por reaboni aŭ remembrigi en 1996. Cetere, ĉu vi jam proponis en via klubo, grupo aŭ asocio kolektivian abonon? La rabato estas tre alloga. En plej multaj landoj la abonprezo restas sama en 1996, sed grupo de 6 homoj jam sufiĉas por detranci 20% aŭ eĉ 40% el la prezo.

Ni klopodu kune plimultiĝi la abonojn por povi plenumi la revu(on) de Detlev Banke!

*Francisco*

# Kiam homar

**Dum kelkaj batalas plibonigante la rilatojn inter homo kaj naturmedio por supera konscio, aliaj plezuriĝas turmentante bestojn. Hilarina Aires el Brazilo raportas pri la "bov-amuzego".**

En Brazilo ekzistas ofero de bestoj en ritoj de makumbo. Kokinoj, katoj, bovoj, kapridoj kaj eĉ bufoj kun la buŝo kudrita estas oferbuĉataj al dioj. La sportkurado de hundoj *greyhound* [grejhaŭnd], sporto devenanta de Anglio kaj Usono, ekpopulariĝas en Brazilo — en ĝi hundoj kuras cele al viva logaĵo (leporo), kiu estas dispecigata, kiam kaptata. Pafo al kolombo estas alia "sporto". Kaj eĉ alia: batalo de kokoj kaj kanarioj dresitaj por lukti ĝis morto. Sed tie ĉi, en Brazilo, ni havas tute apartan fenomenon.

En multaj marbordaj urboj de la ŝtato Santa Catarina [santa katarina] en suda Brazilo, la loĝantoj havas la primitivan kutimon ataki virbovojn intence liberigitajn sur la stratoj. En la paskaj festoj, okazantaj en aprilo, centoj da viroj, junuloj kaj knaboj persekutas kompatindan bovon, kiu estas konstante ĝenata por fariĝi agresema, ĉar tiamaniere la "ludo" estas pli emocia.

Dum la bovo trakuras la stratojn, la ludantoj freneze tiras ĝian voston, brulvundas ĝian haŭton kaj ĵetas lancon. La dolorblekoj de la besto estas terure agrablaj al tiuj homoj, kiuj sentas malnoblan plezuron aŭdi ĝiajn korduŝajn helpokriojn. Kiam la besto laciĝas, la festantoj frakasas ĝiajn piedegojn, tratrauas ĝiajn okulojn, tranĉas ĝian langon kaj fine mortigas la mizeran bovon post longa torturo. Kelkaj preferas eltiri la haŭton de la besto ankoraŭ viva, kiu fariĝas rostita bovaĵo por festi unu plian kruelan ŝercaĵon nomitan "bov-amuzego".

Tiuj "festoj" aperis en Brazilo meze de la 18-a jarcento, alportitaj el la insuloj Azoroj, Portugalio. La tradicio de "bovamuzego" transdoniĝas de patro al filo en diversaj fiŝkaptistaj vilaĝoj. Sed plej rimarkinde estas, ke la ŝtata registaro, urbaj aŭtoritatoj kaj politikistoj stimulas tiun barbaran kutimon. Ili argumentas, ke tio apartenas al la fiŝkaptista kulturo kaj allogas turistojn, sed bestodefendantoj kaj ekologiistoj ne donas paŭzon al la intensa batalo. Tiuj ĉi eĉ sukcesis, ke la supera nacia tribunalo baldaŭ juĝos la praktikadon de tiu kutimo.

Dum Pasko aperas en nacia gazetaro raportoj kontraŭ tiu "festo". La batalo de bestodefendantoj eĉas pozitive ekster la urboj, kie ĝi estas praktikata. Tamen, en tiuj ĉi lokoj, plej granda parto de la popolo ne deziras ĉesi "ludi" tiamaniere. Ili argumentas, ke la kritikantoj troige rakontas pri la konduto de la ludantoj.

**Anstataŭ la realo, nia desegnisto Felip preferis montri al ni, kian taŭro-batalon li dezirus.**



# o ne evoluas

Iam mi ricevis leteron de samideano Georgo Otto Vaske, loĝanta en suda Brazilo. Li petis, ke nia klubo helpu per niaj lokaj ĵurnaloj efektiviĝi peticion sendotan al la ŝatestro de Santa Catarina por ĉesigi la "bovamuzegon". Vaske antaŭprenis nacian kampanjon nome de multaj indignantoj. En sia letero, li rakontas la kutimon, kaj liaj vortoj per si mem atestas la dimension de tiu abomeninda "festo":

"La festego ĉiam komenciĝas meze de alkoholaĵoj, per iu formo de torturo. Por eviti seriozan vundon, la bandaĉo de ebruloj unue rompas la kornojn de la besto. Sekve ili trapikas ĝiajn okulojn. Dum ĉiu akrega bleko de la besto, la bando ululante disputas, kiu malkovras pli kruelan manieron torturi la defendandan beston. Lancoj trapasas ĝin ĉiuflanke. Iu ĵetas benzinon kaj ekflamigas; aliaj rompas la voston — kaj ĉio estas motivo por mokado kaj rikanado."

Nia leganto certe samopinias, ke evoluo estas tio, kio altigas la homon super ties instinkto. La bona homo — tiu, kiu volas kreski en ĉiu senco — neniam aprobas tian fi-amuzegaĉon.

## Malevoluo tra la mondo

Legante la taggazeton *Jornal do Brasil* mi eksciis, ke malhumanaj agoj kontraŭ bestoj okazas ne nur en mia lando. Sekve mi transskribas kelkajn okazaĵojn ankaŭ alilandajn:

### Anglio

- Ĉasado, precipe per hundoj kaj kaptiloj. La predoj estas venditaj antaŭ ol la ĉasisto buĉas ilin.

### Danio

- Linĉado de delfenoj kaj balenoj en la insularo Feroa, inter Skotlando kaj Islando. En la Tago de Danko al Dio, fiŝkaptistoj allogas tiujn marbestojn al la plaĝo por mortigi ilin per tranĉilegoj kaj lancoj.

### Hispanio

- Festo de ŝtonumado kontraŭ bestetoj (leporoj, anasoj, kokinoj), kiuj pendas ligitaj per ŝnuro de la piedoj dum oni alĵetas ŝtonojn ĝis ilia morto. La plej tradicia festo okazas en la urbo Los Llanos de la Sierra.

- Krom la fama taŭrobatalo, la virbovoj fariĝas viktimoj ankaŭ de "pafo al bovo". La "festantoj" klopodas atingi virbovon blovante 20-centimetrajn pikilojn per blovpaŭlo. Detalo: la pikiloj estas faritaj de franciskanaj monaĥinoj de la urbo Coria [korja].

- Personoj kun tuko antaŭ siaj okuloj provas dispecigi kokinojn kaj kokidojn ligitajn ĉe la piedoj al ŝnuro.

- En Toledo, dum la Tago de Danko al Dio (1-a de novembro), anasoj pendiĝas per la piedoj kaj rajdantoj galopantaj sur ornamitaj ĉevaloj klopodas senkapigi la bestetojn per la manoj.

### Pakistano

- Ursoj sendentaj estas malliberigitaj per ŝnuro. Du hundoj de la raso *Bull terrier* [bul terier] lanĉiĝas en la arenon kaj atakas la urson, kiu ne povas defendi sin aŭ fuĝi. Sama urso kelkfoje batalas eĉ trifoje dum unu sama tago. Tio estas popola "amuziĝo" en la provincoj Sindo kaj Punĵabo. □

## La heliko kaj la antilopo

facila

— Kizeiydioko Mayinda, Zairio

**M**boloko, la tre eleganta\* antilopo\*, renkontis foje Nkodia-n, la helikon\*.

"Kiel malfeliĉa vi estas, Nkodia, kiel malfeliĉa estas vi! Vi estas devigata kunporti vian domon kaj ne povas ĝui la feliĉon travojaĝi libere. Mi trairas multe da vojoj minute, sed vi povas fari tion nur en deko da jaroj!"

"Ho-ho!", ridis la heliko, "Ĉu vi vere kredas, ke vi kuras pli rapide ol mi?"



"... Ĉu vi kuras pli rapide ol mi, stulta heliko? Ha-ha-ha! Rediru ankoraŭfoje tiun malsagaĵon, kaj mi mort-premos vin, por lernigi al vi respekti\* min!"

"Mi respektas vin", diris Nkodia. "Kaj por montri, ke mi respektas vin, mi proponas, ke ni konkuru\*. Se vi venkas min, mi plu respektos vin. Sed mi estas certa, ke estas mi, kiu gajnos la konkuron. Tiam vi ŝuldos\* la respekton al mi."

"Konsentite", diris Mboloko. "Ni fiksu lokon kaj horon." Ili decidis veni la postan tagon, kaj antaŭ ol foriri, la antilopo denove primokis la helikon.

La heliko iris renkonti sian fraton kaj diris al li: "Morgaŭ mi konkuros kun la antilopo — sed vi scias, kiom malinteligenta ĝi estas. Vi iros al la fino de la kampo apud la mango\*-arbo, mi restos en la alia flanko — ĝi ne rimarkos, ke ni du estas malsamaj. Ekrapidu tuj, metu vin sur vian lokon. Vi nepre devas esti tie morgaŭ matene."

La sekvan tagon, ĉe la sunleviĝo, la antilopo alvenis. La heliko montris la sekvotan vojon kaj donis la signalon\*.

La antilopo rapidegis kiel kuglo\* ne rimarkante, ke ĝia konkuranto restis surloke. Kiam ĝi alproksimiĝis al la alveno, la alia heliko levis siajn antenojn\* kaj ekkriis la venkon. La antilopo ne kredis al siaj okuloj. Ĝi petis tuj fari la revanĉon\*. La heliko akceptis. Oni donis la signalon kaj la antilopo rapidegis tiom, ke neniu birdo povis sekvi ĝin. Ĝi alvenis al la cel-loko, sed Nkodia jam atendis tie ridetante al ĝi:

"Ĉu vi akceptas, ke vi malvenkis?"

La antilopo devis akcepti sian malvenkon. Ĝis hodiaŭ ĝi ne scias, ke la heliko trompis\* ĝin. Ĉiam kun respektego ĝi salutas ĉiujn helikojn, kiujn ĝi renkontas survoje. □

**anteno:** mola elstarajo sur la kapo de kelkaj bestoj.

**antilopo:** komuna vorto por tre belaj rapid-kuraj bestoj el Afriko

**eleganta:** gustoplene elstara

**heliko:** malrapidega sen-osta besto, kiu ĉiam kunportas sian dometon

**konkuri:** peni superi alian

**kuglo:** metala peco, kiu rapidege eliras el mortigiloj

**mango:** sukoriĉa frukto el varmaj landoj

**respekti:** senti estimon kaj konsideron por io aŭ iu

**revanĉo:** ripeto en sporto aŭ ludo por doni ŝancon al la venkito

**signalo:** interkonsentita signo por komuniki ion de malproksime

**ŝuldi:** devi pagi

**trompi:** vole erarigi



**M**i foje multon imagis pri Mongolio. Ja mi legis pri la mongoloj, ja mi studis pri ilia historio. Stepo. Senfinaj vastoj. Kurantaj ĉevaloj. Jurtoj. Mongoloj, kiuj foje kreis la plej grandan imperion, kiu iam ekzistis en tiu ĉi mondo. Mi volis aliĝi al tiuj rajdantaj homoj kaj galopi tra la stepo al nenio kaj nenie, nur mi kaj mia ĉevalo sub la granda ĉielo.

Revoj restas revoj. La mondo aspektas alie. Mongolion mi jam travojaĝis, kaj nun aperas Interna Mongolio en mia vojaĝplano. Esperantistoj avertitaj; mi sidiĝas en trajno en Pekino por fruege matene alveni al la Blua Urbo, mongole kaj internacie *Hohhot\**, ĉine kaj pli komplike *Huhehaote*.

### En la temploj de la Blua Urbo...

Estas klara mateno: en la pala ruĝo de la leviĝanta suno fumo pendas. La homoj evidente hejtis multe lastnokte. La mateno estas pli ol freŝa — ĝi estas frida. En la fono mi

vidas siluetojn de montaro. La urbo preterflumas dum mi babilas kun la lokaj esperantistoj renkontintaj min. Al mi Hohhot lasas impreson de kutima ĉinia urbo. Tamen la koloroj kaj sonoj mesaĝas dum antaŭtagmeza ekskurso (on plani mi vidas kaj aŭdas mongolojn, kies lingvo agrable karesas miajn orelojn, kaj eksentas, ke efektive Hohhot estas limurbo inter la t.n. ĉinoj kaj la t.n. neĉinoj, ĉefe mongoloj ĉi tie.

Ni vizitas en granda trupo kelkajn templojn en Hohhot. Tra mallargaj stratoj al lamaismaj temploj, kie diversstile prezentigas gardistoj kaj dioj de budhismo tibeta, nun mongola, tom mi ekkomprenas, kiom timigas la homojn tiaj figuroj — en duonmallumo konfrontita monstro skuas eĉ skeptikan eŭropanon...

### ... Sub la luno

La posttagmezon ni pasigas gaje babilante — la intimeco kaj senpereco de la internamongoliaj samideanoj estas frapa — kaj ĉiufanke stariĝas demandoj pri tio kaj jeno. Maloftas eĉ en Esperantujo tiom tujaj interkomprenigoj rektaj, sed ĉi tie mi spertas mirindan proksimecon en la komunikado.

Vespere mi estas invitita por kunfesti la Lunfeston, faman kaj gravan feston por ĉinoj, kaj havas la okazon sperti la laŭdindan kuirarton de kelkaj lokaj esperantistoj. Dum en la urbo lunadmirado, krom mangado, estas la plej ŝatata okupo ĉi-nokte.

**Ŝia lasta vojaĝo kondukis  
Sabira Ståhlberg al Interna Mongolio.  
Pro peto de niaj legantoj ŝi nun rakontas,  
kion ŝi spertis en la lando de Ĝingis-Ĥano.**

# De Beijing en Interna Mongolio

### Surĉevale al la hunoj

La unuan de oktobro, nacia festotago (fondo de la Popola Respubliko). Mi estas denove kunvenigata kun akompana trupo, inkluzive de nepo de s-ro Li Sen, prezidanto de la loka Esperantoklubo, kaj la suno brilegas.

Sur la programo estas vizitoj: ekskurso al la plej granda azia ĉevalkurejo — kiu kompreneble ne funkcias, sed des pli impresa pro sia vasta malpleno — kaj pli longa ekskurso al la tombo de Wang Zhaojun [ŭang ĝaoĝjun].

Tiu ĉi brava ino estas admirata kaj priplorata tra la tuta historio ĉina: ŝi (kompatinda!) devis edziniĝi al la reĝo de la hunoj kaj ekvivi sur la stepo, fore de la luksa imperia kortego ĉina. Wang Zhaojun tamen, tiel diras la ĉinaj fontoj, ekcivilizis la barbarojn. Kiam ŝi mortis, ili faris por ŝi grandan tombon en la regiono — ĉi tie, ekster Hohhot. La nura problemo estas, ke da ŝiaj tomboj troveblas minimume tri en la regiono kaj unu ekster... La grimpado estas agrabla, kaj de la pinto videblas la montaro kaj la ebenaĵo, flaviĝinta, kie kamparanoj, kiel punktoj nigraj, ankoraŭ laboras sur

la kampoj. Aŭtuna freŝo en la aero ĉirkaŭas nin. Odoras je fumo.

Se mi estus ĉina poeto, mi supozeble verkus poemon pri la trankvila pejzaĝo, kie ĉio moviĝas sed tamen restas senmova, sentempa. Estante tamen nur grandnazulo, mi konstatas tute proze, ke la etoso, la loko kaj la pejzaĝo plene kaptis min, kaj ke mi ne povas rezisti ĝeman de kontento, ke mi venis kaj vidis.

### Al historia mango

Lasta itinera punkto: muzeo! Skeleto de dinosaŭro, objektoj el diversaj tempoj. Bone provizita muzeo estas en Hohhot kaj tie ni pasigas horojn rigardante ĉiun etan objekton kaj diskutante tien-reen pri la historio kaj antaŭhistorio. Tamen praktika detalo konvinkas nin forŝirigi: Li Sen anoncas, ke tagmango atendas. Ĝi ne nur atendas sed fre abundas, kaj mi mangas kvazaŭ mi nenian vidintus mangajojn! La akompana babilado kaj drinkado plintensigas la etoson, kiu estas rompita nur de la anonco, ke trajno atendas. Estas tempo foriri de Hohhot, kies varma etoso kaj malvarma sed suna vetero restas la du ĉefaj impresoj ĉe mi. Krom la blua ĉielo.



## Sable kaj rivere

Samtage mi atingas Baotou, akompanate de du lokaj esperantistoj. Baotou mem estas terure industria urbo, sed ĝi troviĝas meze de kelkaj belegaj lokoj: proksime al la Ordos-stepo, proksime al la Flava Rivero, proksime al la memorhalo de Ĝingis-Hano, kaj proksime al la granda tibeta-mongola templo Wudanzhao [udanzhao].

Unua haltejo: dezerto.

Mi preskaŭ kredas, ke mi rigardas televidon kaj ne mem estas ĉi tie, tiom nerealas la ekstrema silento kaj senmoveco de la sablaj dunoj. De pli proksime rigardante, mi vidas spurojn de serpentoj kaj aliaj bestoj sur la fajna sablo. Mi prenas en la manon iom da sablo, kaj



*Ĉe tiu ĉi obo vivas spirito, kiu koleriĝas, se preterpasanto ne aldonas ŝtonon.*

\* Prononcu kiel skribite, krom se la nomon sekvas interkrampa prononcindiko.

## Rondiri obon

Ĉe la memorhalo — novkonstruita — de Ĝingis-Hano staras obo. Tiu ĉi speco de obo estas tipa por la regiono, kolektaĵo de ŝtonoj kun bastonoj kaj tukoj sur la pinto. Necesas surmeti ŝtonon kaj rondiri trifoje por ne kolerigi la obo-spiriton, kiu povas aŭ beni aŭ malfeliĉigi la vivon de vojaĝanto. En Tibeto abundas tiaj ĉi “ŝtonkolektaĵoj”, same tra la tuta lamaisma parto de hodiaŭa Ĉinio.

La memorhalo mem estas impona konstruaĵo en moderna stilo. La tuta rakonto pri la vivo de Ĝingis-Hano estas pentrita sur la muroj. Sur altaroj por li, lia edzino kaj generaloj staras vodka, sukero kaj aliaj ne rapide putrantaj objektoj. Jurto estas konstruita en la ĉefa halo, memorobjektoj mongolaj kuŝas ĉie kvazaŭ en muzeo. Ĉirkaŭe zumas vespoj — mi fuĝas de halo al halo. Ekstere jam varmegas, la suno zenitas. Kaj la mongoloj ĉe la pordo dormas. La ebena stepo kun sia pala verdo vibras de varmo kaj suno. Ie videblas punktaro pala, supozeble ŝafa hordo. “La temperaturoj tre varias ĉi tie”, komentas iu.

Revene ni haltas ĉe la Flava Rivero, kaj s-ro Xiao [ŝjao] diras, ke eblas naĝi en ĝi. Ĝi tamen havas subfluojn, kiuj danĝeras al



naĝanto, ĉar ili povas tiri fibron sub la akvojn kaj de ili liberiĝi ne eblas.

Vespere s-ro Xiao montras filmon pri Interna Mongolio kaj ĝia industria kresko. Fakte en Interna Mongolio ekzistas pluraj urboj tre grandaj kaj industriaj, kie vivas ĉinoj, kaj la resto estas stepo aŭ dezerto aŭ montaro, kie vivas mongoloj. Sed ankaŭ multaj mongoloj jam vivas en la urboj, kaj de la stepa romantiko oni nur vidas malmulton en viziteblaj lokoj. Multaj regionoj estas neatingeblaj krom per ĉevalo.


## Permerite al la paradizo

Lasta tago: Wudanzhao, miksitaj vorto ĉina-mongola. Miksitaj templo tibeta-mongola. Ĝinvoje, halto ĉe unu el la murpecoj troviĝa tra tuta norda Ĉinio, de la ĉinoj tuj baptita Granda Muro. Historie neble tiel ĝin difini, sed fakte restas, ke arkeologio pruvas ĝian aĝon je ĉirkaŭ 3 000 jaroj.

Wudanzhao estas tre interesa kaj tre bunta sperto. Ĝi hano maljuna volas paroli al ni pri meritoj budhismaj, kiuj helpas al homo eniri la paradizon; kaj kiel la mondo aspektas hodiaŭ, sed mi malfacilo komprenas la lokan lingvon (ĉina, principe, sed tamen...). Junuloj postfajfas nin. Kelkaj malfruaj turistoj vagas, kiel ni, tra la haloj admirante. Ekstere suno brilas, la ĉielo bluegas. Silento disvastiĝas tra la valo. Mi ne bezonas iri al la paradizo, mi volas resti ĉi tie. Mi tamen devas reveni al la realo, ĉar atendas min... tagmanĝo!



*Antaŭ la memorhalo de Ĝingis-Hano en Interna Mongolio, Ĉinio. Dekstre, du diversaj temploj en Hohhot.*



en la vento ĝi disflugas kiel faruno. Denove la sama afero. Mi sidigas en la sablon — sentiĝas kiel neĝo, same ĝi malvarmas ĉar ankoraŭ la suno ne varmigis ĝin. Mi provas iri en ĝi sed glitas kaj sukcesas bone iri nur kelkajn paŝojn, dum la ŝuoj pleniĝas per sablo. “Tra tiu iris karavanoj”, mi pensas, kaj plene komprenas, kial progreso de karavano malrapidas.



# Koncize pri la mongola kulturo

Mongolio troviĝas en Centra Azio, inter Rusio kaj Ĉinio. La lando havas pli ol du milionojn da loĝantoj. Ekde la antikvaj tempoj mongoloj okupiĝas pri brutarbredado, kion nuntempe daŭrigas la kamparanoj. Fakte, ili estas kaj restas nomada popolo. Jen kelkaj eroj de la spirita kulturo mongola.

## Prakredoj helpas protekti la medion

Ĝis la 16-a jarcento, mongoloj havis ŝamanisman kredon. En la antikvaj tempoj ili imagis, ke ĉiuj montegoj, riveregoj kaj grandaj lagoj havas sian mastron, in- aŭ vir-seksan. Oni diras, ke nur en escepta okazo, precipe noblaj kaj senkulpaj homoj povas vidi ilin per siaj propraj okuloj. La mastroj povas havi diversajn aspektojn, ekzemple homan, aŭ serpentan, aŭ lupan. Mongoloj ankaŭ multe respektas la Ĉielon, Teron, Sunon, Lunon kaj Fajron. Ili kredas, ke eĉ la vento havas sian mastron. Jen kial ĝis hodiaŭ dommastrinoj ĉiumatene oferĵetas freŝan lakton por kontentigi ĉiujn menciitajn mastrojn. Samtempe ili petegas la favoron kaj gardadon de la mastroj. Mongoloj tute ne permesas al si kaj al aliaj enigi sangon, viandon kaj lakton en riveron kaj lagon. Ili eĉ ne lavas ion en tiuj akvofontoj — se iu ne plenumus tiun tradician mordevon, tuj koleriĝus la koncerna mastro kaj pro tio ankaŭ tuj sekvos diversaj malfeliĉaĵoj, ekzemple inundo, brulego, ventego aŭ perdiĝo kaj pereado de la brutaro, nekuraĉeblaj hommalsanoj ktp. Bedaŭrinde nun la urbanoj tute ne plenumas tiun tradician mordevon de sia popolo.

Meze de 17-a jarcento la religio de Budho ekpenetris en Mongolion el Tibeto. Budhismo kaj ŝamanismo dum multaj jaroj interbatalis, sed fine venkis la unua, kiu nun estas la ŝtata religio. Tamen, mongoloj heredigas siajn sciojn kaj kredojn pri la naturo ĝis hodiaŭ. Kaj tio, por merito de niaj antaŭuloj, multe helpas kaj helpos al ni protekti la medion.

## La sekreta historio

Mongoloj havas riĉan folkloron: mitoj, legendoj, fabeloj, eposoj, ritmaj bondeziroj, laŭdaj melodiversoj (dediĉataj al luktistoj, pafarkistoj kaj kurĉevaloj), popolaj kantoj, enigmoj, proverboj, aforismoj kaj aliaj.

Nuntempe ni scias, ke *La sekreta historio de mongoloj* estas konsiderata unika libro, kiu atingis nian tempon el la fora 13-a jarcento. Ĝia aŭtoro skribis la historion uzante preskaŭ ĉiujn ĝenrojn de la tiama mongola folkloro. Konata tra la tuta mondo, tiun verkon, tradukitan al pli ol 20 lingvoj, esploras sciencistoj en multaj landoj de la mondo.

## Bondeziremaj

En la mongola lingvo estas esprimoj kiel "ora (aŭ flava aŭ ruĝa) suno", "arĝenta (aŭ blanka) luno", "animo bona kiel blanka lakto", "animo nigra kiel fulgo", "nigra peko", kaj "nigra afer-aĉo", ktp. El tiuj esprimoj

**Ĉimidijin  
Dogsuren  
rakontas pri  
la kulturo de  
sia lando,  
la "ekstera"  
Mongolio, kiu  
konsistigas la  
Respublikon  
Mongolio —  
sendependan  
ŝtaton.**

*Ĉi-maldekstre,  
de supre suben  
vi povas legi (!)  
"Internacia Ligo  
de Esperantistaj  
Instruistoj" en la  
mongola skribo.  
Sube, Sabira (dua de  
maldekstre) kaj  
kompanio pozas por vi  
antaŭ ol entrepreni la  
voradon. Malantaŭ  
ili murbildo montras  
scenon de la mongola  
kampara vivo.*



Sabira verkis libron pri siaj vojaĝoj, *MALANTAŬ LA MURO — PUZLEROJ PRI ĈINIO*. Tokio: Internacia Kultura Laborejo, 1994. 72+6p. 21cm. 72+6p. 21cm. Ilustr. 18,00 gld. ĉe la Libroservo de UEA.



## Modela UN-sembleo en Esperanto

**E**ble kelkaj partoprenantoj de la UK en Tampere preterpasis dum kongresa tago aron da junuloj kaj miris pri ties aparta konduto. Kelkaj arde diskutis, aliaj per ĝentilegaj vortoj kalumniis unu la alian, denove aliaj konspire kunmetis la kapojn kaj malaŭte interparolis.

Nu, verŝajne temis pri paŭzo de la modela UN-sembleo. Dum tuta tago tie "reprezentantoj" de diversaj ŝtatoj diskutis pri rezolucio, elpensis strategiojn kaj baraktis kontraŭ la komplikega regularo de UN-sembleo.

La rezolucio jam de la komenco estis malbona (ĉar la ruzaj organizantoj estis enmetintaj evidentajn erarojn por instigi al forta diskuto), kaj fine malbona kaj... malakceptata! Kion oni povus atendi de unu-taga laboro — eĉ se pere de Esperanto?

Kompreneble, ĉiuj amuziĝis kaj lernis. Konkludo: venontfoje ni kapablu eĉ pli potenco-pense strategi kaj ĝentile insulti, sed ankaŭ efike kunlabori por la bono de la mondo.

S. Ralf Gion Fröhlich, Svedio



Dum momento de la modela UN-sembleo

FRANÇO VIEUHEY

instruado

## La "interkona" mnemoniko

— Detlef Meier, Germanio

**Kiu ne jam partoprenis Esperanto-renkontiĝon kun interkona vespero, en kiu oni aliĝas al ludo por parkerigi la nomojn de la aliaj esperantistoj?**

**Ĉ**iu sidas en rondo. Unu komencas prezentante sin kaj ion ŝatatan de li kun la sama komenclitero de sia nomo, ekz.: "Mi estas **R**afaĉo kaj ŝatas **r**afanetojn." La dua ripetas tion kaj tuj poste faras la samon kun si mem, ekzemple: "Li estas **R**afaĉo kaj ŝatas **r**afanetojn. Mi estas **G**eorgo kaj ŝatas **g**ramatikon." Fine la lasta, sidanta apud la unua, ripetas ĉies nomojn kaj ŝatatajn aferojn. Ion similan oni povas fari en Esperanto-kurso kun novaj vortoj de nova leciono aŭ dum Esperanto-kunveno kun vortoj pri iu temo, ekzemple arboj, bestoj, insektoj, birdoj, la homa korpo, manĝaĵoj, muzikiloj, vestoj, vetero k.a.

Certe ĉiu iam havis problemon memori Esperantan vorton aŭ la signifon de tiu vorto en la propra lingvo, ĉar ĝi ne similas al vorto en unu el la konataj lingvoj. Tiam oni povas uzi mnemonikon. Tio funkcias jene: serĉu al la nova vorto similonan vorton. En viaj pensoj ligu ambaŭ. Ekzemple, vi jam konas la vorton *atendi*. La nova vorto estas *atenti*. Per la frazo "Mi atentas pri atendejo" vi ligas ambaŭ kaj en viaj pensoj vi ekzemple imagu, ke vi ne trovas la atendejon en stacidomo, sed jen subite vi ekatentas pri la ŝildo "Atendejo". El la malfacile memorebla vorto *atenti* vi faris pli facile memoreblan frazon. Tion vi povas fari kun multaj vortoj:



Vi povas vojaĝi per aŭto en aŭtuno, vidi azenon en Azio, fakturi fakliteraturon, havi fermilon el fero, fosi sur foto, uzi fulmon por filmo, meti glacieron en glason, skribi

per karbo sur karton, legi pri legomoj en kuirlibro, al vi povas manki mantelo, muso povas aŭdi muzikon, vi povas nombri nomojn kaj havi numerojn sur nuboj, vi povas palpi panon kaj verki poemon pri ponto, salti en salono, meti tabulon sur tablon, tuŝi turiston, trinki vinon en vintro. Ludu kun via imagokapablo. Vi povas uzi ankaŭ nacilingvajn memorhelpilojn.

Instruantojn mi avertas: ekzistas lernolibroj, kiuj havas novajn similajn vortojn en la sama leciono. Tiukaze mi havis la problemon diferencigi ilin — tion mi aŭdis ankaŭ de aliaj personoj. En la kazo de *atendi* kaj *atenti* aŭ *afabla* kaj *agrabla* en la sama leciono, certe ĉiu serĉas memorhelpon. Pli facile estas instrui unu, prefere la pli oftan el ambaŭ vortoj, jam unu lecionon antaŭe. Poste tiu vorto povas esti memorhelpo por la alia, nova vorto. □

Alain Fournier

### La granda Meaulnes

Fama priskribo de pura amo.  
La sola verko de la aŭtoro,  
kiu mortis nur 27-jara.

El la franca trad. Roger Bernard. Rotterdam/La Laguna: UEA/J. Régulo, 1988/1975 (eldono/preso). 222p. 21cm. Belliteratura serio 32. Prezo: 22,50 gld.

KONTAKTO n-ro 148 (1995.4)



# anonc tabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

**Du 24-jaraj komercantinoj** deziras korespondi kun geesperantistoj diversaĝaj el la tuta mondo, ĉefe el Armenio, Ĉilio, Estonio, Grekio, Hindio kaj Kartvelio. I.B. Indrani-2, k-z Tērvete, LV-229431 Dobeles Raj., Latvio.



**22-jara junulo serĉas amikinojn** el kiu ajn

mondoparto por serioza, fidela amikeco kaj eventuala geedziĝo. Respondo garantiita al ĉiu, kiu respondos kun foto. Jordan K. Velikov, str. Haĝi Dimitar 7, BG-5250 Svištov, Bulgario.

**16-jara komercanto** deziras korespondi tutmonde. Masud Eynavi, Bank Maskan Markazi, Bahar Str., IR-69156 Borujerd, Irano.



**22-jara studento**

deziras korespondi kun la tuta mondo. Skribu al Kabindra Raj Shakya, P.O. Kesto 10128, Katmandu, Nepalo.


**17-jara komercanto** deziras korespondi tutmonde. Farshad Dadkhah, N-ro 7 Sh. Beheshty Str. Modares Ave. IR-69156 Borujerd, Irano.

## Krucvorto

facila

— Claus Günkel, Germanio

**Sendu vian solvon al nia redaktejo antaŭ la 25-a de novembro 1995. Vi povas gajni T-ĉemizon KONTAKTO. Diru, kiu estas via mezuro!**



### Vertikale

- Centblo de mil
- Inde je forsendo
- Post "antaŭ"
- Varma trinkaĵo (s.f. = sen finaĵo)
- Usona orienta urbego
- Libregoj, kiuj klarigas aŭ tradukas vortojn kaj esprimojn
- Parto de io (s.f.)
- Universala Kongreso
- Ĝis
- Vi kaj mi

### Horizontale

- Nomo de litero inter "o" kaj "r"
- Tiel nomata
- Komencu (s.f.)
- Densa likvaĵo, i.a. por kuiru
- Nomo de litero inter "p" kaj "s"
- Maljes
- Malveno (s.f.)
- Ujo por 4 vertikale (s.f.)
- Internacia respond-kuponon
- Ne neniu
- Valorega metalo (s.f.)
- Artikolo
- Donata ĉe donaco (s.f.)
- Mallongigo de "Esperanto"
- Prepozicio
- Lu afero

Se vi kapablas krei facilajn krucvortojn kun simetria dismeto de nigraj kvadratoj, sendu ilin al KONTAKTO!

# Aidoso: rifuĝo en

*Ni trompas nin pensante, ke la lumo en la fino de la tunelo estas taglumo. Fakte, temas pri la ĉeflampro de atakanta trajno.*

**E**n 1978, kiam Monda Organizaĵo pri Sano fiksas la celon "Sano por ĉiuj en la jaro 2000", aidoso kaj la HIV-viruso ne estis malkovritaj. Kaj kiam la unuaj kazoj de tiu ĉi nova sindromo estis priskribataj en 1980, HIV jam estis disvastiĝinta tra tutaj kontinentoj en epidemiaj proporcioj.

En la pasintaj 15 jaroj ni akumulis vastajn kvantojn da kono pri HIV. Nun ni scias, kiel plilongigi la vivon de aidospacientoj. Ni ankaŭ scias, kiel homoj povas protekti sin kontraŭ la viruso. Tamen, HIV plu infektas proksimume po 6 000 homojn tage. Je la fino de la jarcento la nombro de virusportantoj povus atingi 40 milionojn.

La fakto estas, ke nia konstante kreskanta kono ĉefe helpis difini pli klare, kion ni ne scias... kaj kion ni ne volas scii.

Tiaj demandoj leviĝas parte pro la aparta karaktero de la HIV-viruso: la maniero en kiu, por certigi sian propran travivon, ĝi celas kaj detruas la homan imunsistemon; la maniero, en kiu ĝi daŭre ŝanĝas la genetikajn karakterizojn, kiuj malfaciligas je longa tempo disvolvi efikan vakcinon; kaj la fakto, ke ĝi implicas sekson kaj sangon — kiujn plejparto el la socio taksas sakralaĵo aŭ tabuo.

### Kieloj kaj kialoj

Ni ankoraŭ ne scias, ekzemple, kie aŭ kiel la viruso ek-estis. Ĉu ĝi estis transdonita de aliaj primatoj al homoj? Ĉu ekzistas aliaj homaj sub-tipoj de la viruso krom HIV1 kaj HIV2? Ĉu eblas disvolvi vakcinon? Kial kelkaj homoj estas pli rezistaj ol aliaj?

Eĉ pli malfacile respondeblaj estas la ampleksiĝanta kampo de sociologiaj kaj etikaj demandoj. Ĉu estu enkondukita deviga aidosotesto? Ĝi ne pruviĝis efika por preventi, kaj plej ofte nutras la homan timon kaj la diskriminaciajn sintenojn jam enradikiĝintajn en la socio. Tamen, tiu ĉi demando, kiu estas esence afero de homaj rajtoj, certe trudiĝos pli kaj pli ofte.



*Tiu ĉi afrika avino okupiĝas pri siaj nepoj orfigitaj de aidoso.*



# malkonon

Kaj poste, kiel ni povas konvinki homojn protekti sin mem? Ni scias, ekzemple, ke kondomoj povas preventi la seksan transdonon de HIV/AIDS. Sed la homoj ĝenerale ankoraŭ rifuzas konsekvence uzi ilin. La kialoj varias de kulturaj ĝis financaj, sed niaj esploroj montris, ke kelkaj homoj efektive preferus morti anstataŭ uzi tiun ĉi simplan kaj efikan protektorimedon.

Pasis multaj jaroj antaŭ ol kelkaj landoj konfesis, ke ili eĉ havas unu plian problemon pri aidsoso, por eĉ ne paroli pri kuraĝigo de kia ajn publika diskutado aŭ preventa edukado. La homoj ankoraŭ kredas je viruskontaĝo fare de kuloj, kio neniam estis dokumentita, fuĝante de publika debato pri la seksa kontaĝo, kiu estas la vera kaŭzo. Kial tiu ĉi malemo? La vero estas, ke ni ne scias sufiĉe pri homa sekskonduito kaj kulturaj sintenoj pri sekso por doni respondojn al tiuj ĉi demandoj.

Rifuzi agnoski la problemon signifas ankaŭ fermi niajn okulojn antaŭ la sekvoj. En kelkaj afrikaj landoj 70 procentojn de la hospitalaj litoj jam okupas aidsopacientoj. Ilia nombro certe kreskos, sed ĉu estos adekvataj sociaj kaj medicinaj provizoj por trakti ilin? Kio okazos al iliaj orfoj?

Ni jam vidas en kelkaj landoj ian "generacian breĉon" kaŭzitan de la morto de aidsopacientoj — ordinare junaj homoj en la unuaj jaroj de sia vivo, membroj de la laborforto, impostpagantoj, gepatroj. Kio estos la efiko de tiu ĉi breĉo, kiam la mortokvanto estos grimpa ĝis dekoj da milionoj? La plejparto de la antaŭviditaj 40 mili-


onoj da homoj infektitaj per HIV ĉirkaŭ la jaro 2 000 estos junaj afrikanoj kaj azianoj. Kion signifos ilia pereco al la ekonomia kaj socia disvolviĝo de iliaj landoj?

Ni taksis, ke nuraj 20 miliardoj da usonaj dolaroj estos elspezandaj la venontajn kvin jarojn por efektivi la plej bazajn el la preventaj programoj en la disvolviĝanta mondo kaj iom post iom malakceli la rapidon je kiu HIV kreskas. Nur frakcio de tio estas efektiviĝanta nuntempe. Malgraŭ diversaj "pintkunvenoj", la politikaj gvidantoj ne sukcesis aŭ ne deziris ligi siajn politikajn proponojn kun la rimedoj bezonataj. Kial, se jam tiel evidentas kiom ruiniga la skuo de aidsoso estos en la 21-a jarcento?

La aidsosopidemo estas tiom modelo de scio faliganta la murojn de malkono, kiom ekzemplo de neagnosko kaj rifuĝo en malkonon. Ni devas rekoni, ke ni havas tragedion de planeda proporcio pro tio, kion ni ne scias kaj ankaŭ pro la rifuzo de tio, kion ni ja scias: la amplekso kaj la disvastiĝo de la epidemio, la malvolvo efektivi la necesajn intervenojn por preventi ĝin, kaj la manko de morala devontigo kaj financaj rimedoj por haltigi ĝin.

**Dorothy Blake**  
(esperantigita el  
UNESCO SOURCES n-ro 68,  
aprilo 1995)

**D-rino Blake** laboras por Organizaĵo de Sano kiel Direktoro de Ekstera Kunordigado kaj Mobilizado por la Globa Programo de Aidoso.



*Tiu ĉi infano de Nov-Jersejo, Usono, estas viktimo de aidsoso.*

## KONTAKTO Abonkonkurso 1995

La pasintan 6-an de aŭgusto 1995, dum la 51-a Internacia Junulara Kongreso en Sankt-Peterburgo, Rusio, TEJO lotumis la premiojn por la ĉi-jaraj abonantoj de **KONTAKTO**. Entute estis lotumitaj ses premioj:

La 1-an premion, **NUDPIEDA GEN**, gajnis **Muhibullah Olajide Ismaila el Niĝerio**;

la 2-an premion, **VIVO DE ZAMENHOF EN BILDOJ**, gajnis **Jonathan Loopstra el Usono**;

la 3-an premion, kompaktdiskon **KOMPIL'**, gajnis **Mark Shoulson el Usono**;

la 4-an premion, T-ĉemizon **KONTAKTO**, gajnis **Mariangela Pimentel de Moreira el Brazilo**;

la 5-an premion, **ASTERIKS KAJ KLEOPATRA**, gajnis **Slavoljub Radosavljević el Jugoslavio**; kaj

la 6-an premion, **KUMEŬAŬA, LA FILO DE LA ĜANGALO**, gajnis **Anthony Eddison el Britio**.

**Niajn varmain gratulojn al ili ĉiuj!**

### ATENTON, MALFORTVIDANTOJ!

Vi povas senpage ricevi **KONTAKTO** voĉlegitan. Necesas nur sendi du 60-minutajn kasedojn al Elise Lauwen, Neerstraat 165, NL-5215 AP 's-Hertogenbosch, Nederlando.





# Por kio utilas tabako?

— Alberto García Fumero, Kubo

**Estante mem “ero de fumo”, nia kuba kunlaboranto plenrajte informas nin pri la planto, kiu tiom plezurigas kaj turmentas la homaron.**

**E**n tiuj ĉi tempoj de medicinista bombardado kontraŭ fumado, laŭdi tabakon ŝajnos herezo al la pli kalcitremaj. Sed pardonu min, mi tute ne pledos por fumado, sed por pli sanigaj uzoj de la tabaka folio. Ĉar tabako ne egalas al fumado... multifacetaj estas ĝiaj uzoj. Ne senkaŭze kelkaj eĉ pensis, ke tabako estas la planto malpermesita de Jehovo en la Ĝardeno Paradiza...


Ni devas komenci agnoskante, ke krom helpi pasigi la tempon, tabako vekas amikecon. Kio? Jes, vi bone aŭdas. Kiom da amikiĝoj kaj eĉ amrilatoj naskiĝis de tiu olda demando pri fajro?

Dum multe da tempo oni uzis la planton en formo de snuftabako. Krom instigi al ternado — kio ne nur klarigas nazojn sed ankaŭ mensojn — laŭ Aristotelo, snuftabako plenumis la saman gravan socian rolon, kiun hodiaŭ plenumas cigaredoj. Kaj maĉtabako estis iam tiel disvastiĝinta kiel maĉgumo hodiaŭ.

Iam oni pensis, ke tabako estas saniga. Tiu koncepto estas sufiĉe malnova, ĉar la amerikaj indianoj multe uzis ĝin tiucele. En tiuj tempoj, kiam papo Paŭlo la 3-a provadis enkapagi al la karitatmankaj konkerantoj, ke ankaŭ la indianoj animon havas, kuraci tumoron per tabakoplena

sputo estis unu el la plej bonaj kuraciloj uzataj de sorĉistoj. Pu!

Laŭ la kuba erudiciulo Ortiz, hispanoj uzis tabakan tizanon por kuraci sifilison. Ankaŭ tizane oni uzis tabakon por sendorigi (!) la buŝon kaj por lavi al si nazon, okulojn, kaj eĉ la tutan korpon. Onidire,



*Monaĥo Bartolomé de Las Casas (maldekstre), rakontis pri la praktiko “cohoba” de la kubaj indianoj (supre).*

tabaka tizano kuracis reŭmatismen, nazkataron, katarakton, urinreteniĝon, maldigestadon kaj “malvarmajn dolorojn” — ĉiam laŭ Ortiz.

Ankaŭ kataplasme oni ĝin uzis por kuraci diversajn malsanojn.

Por mildigi dolorojn la kubaj indianoj maĉis tabakon, poste metis la buŝon sur la doloran parton, suĉis, kaj kraĉis alien la malsanon. Ankaŭ eblis transdoni al homo la magiajn proprajojn de la planto.

Vomiga estas la miksaĵo el cindro kaj tabako, laŭ Las Casas. Indianoj ĝin uzis por rita purigado. Oni ankaŭ rakontas, ke kelkaj konkerintoj uzis rimedon tian por ebligi al si pli longdaŭrajn festenojn...

Laŭ Bernardino de Sahagún, en la antikva Meksiko patro kelkfoje portadis en saketo ĉe la brusto iom da tabako kun la celo, ke lia naskiĝonta ido estu bonfarta. Aliflanke, oni ankaŭ certigis al si bonan dormon, se amuleto oni metis iom da tabako sub la kapkusenon, ĉar ĝi elpelas la demonojn.

La meksikaj indianoj rite blovdadis fumon de tabako je la kvar ĉefpunktoj por certigi pluvon. Jen bona novaĵo por terkulturistoj...

Ni ĉiuj scias pri la kutimo de la nordamerikaj indianoj fumi pacpipo, kaj ankaŭ fumi grupeto el la sama pipo dum analizo de grava problemo, aŭ antaŭ ol alpreni gravan decidon. Same multaj el ni bezonas ekbruligi cigaredon antaŭ ol komenci gravan konversacion.

La kubaj indianoj uzis tabakon dum ceremonio por demandi al kandidata arbo, ĉu ĝi deziras, ke oni faru el ĝi idolon. Oni snufis tabakpulvoron por demandi al la diaĵoj, ĉu venko super la malamikoj estas certa. Laŭ Las Casas, ceremonio, pulvoro ktp, ĉio estis nomata “cohoba” [kohoba], de kie venis la hodiaŭa marko “Cohiba”, tiel intime ligita al bonaj cigaroj.

Fine, dum la verkado de ĉi tiuj notoj oni sciigis min, ke akvo en kiun oni enmetis stumpton de forfumitaj cigaredoj dum du-tri tagoj taŭgas por mortigi fungojn de plantfolioj. Ĉu ne interese?

Nu, kiu el vi havas cigaredon? □

popole

## Testudo en Spiritlando

— Oshó-Davies Olúwábùnmi, Nígerio


**I**am estis spiritlando, kien neniu iris, ĉar ĉiuj timis, ke la spiritoj eble mortigos ilin. Laŭrakonte Spiritlando estis fruktodona, tre bona por kulturado. Luj diris, ke kiu povus kulturi ĝin, tiu ne bezonus labori ĝis la maturiĝo\* de tio, kion ajn li plantis.

Nun Testudo\*, kiu estis mallaborema, deziris planti sian maizon\* tie, por ke ĝi kresku sen ke li devu labori. Ĉiuj loĝantoj de lia vilaĝo atentigis lin, ke neniu kuragiĝis kulturi la Spiritlandon — sed Testudo ne deziris aŭskulti.

En la dua tago li iris al Spiritlando kun multaj iloj kaj la grenaro. Li alvenis kaj eklaboris, sed subite li aŭdis voĉon:

“Kiu estas ĉi tie?” Timeme, Testudo respondis “Estas mi, Testudo.” La voĉo demandis plue: “Kion vi faras?” Testudo respondis: “Mi laboras.” Estis silento dum kelkaj minutoj kaj poste la voĉo diris: “Testudo laboras — ni iru por labori kun li.” Tiam alvenis aro da spiritoj kun iloj en la manoj. Senforte, ili eklaboris. Dum malmultaj minutoj la spiritoj jam kulturis pli ol la kvanto, kiun testudo bezonis. Ili helpis planti la maizgrenaron. Goje revenis hejmen Testudo.

Kiam la edzino de Testudo vidis la kulturitan kampon en la sekva tago, ŝi miris, kiel ŝia mallaborema edzo povis fari tiel grandan laboron — sed li respondis superece, ke li sola faris la tutan laboron. Li ne permesis al siaj edzino kaj infanoj scii la veron — por ke ili vidu, kiel laborema li estas.



facila



# Toleremo: ĝis kiuj limoj?

— Ana Montesinos, Britio

## 1995 estis deklarita de Unuiĝintaj Nacioj Jaro de Toleremo. Jen interesa pripensoj pri la temo.

**K**ial diable — mi min nur demandas, mi elektis tiun ĉi temon se mi scias, ke estos ege malfacile al mi envortigi miajn pensojn kaj emociojn tiurilate?

La respondo povas esti nur, ke mi tre forte sentas pri tio, kaj malgraŭ la fakto, ke la limoj estas ĉiam iom nebulaj kaj ke precizigi ilin estos granda defio al mia esprimkapablo, mi kuraĝis alfronti ĝin kaj esperas, ke sur la vojo mi plej verŝajne sukcesos iom pliklarigi miajn pensojn tiurilate, eĉ al mi mem.

Oni povas kompreni toleremon el diversaj vidpunktoj. Por kelkaj ĝi povas signifi, ke vi devas esti bonkora al subuloj, kaj tio naskas patronismon. Por aliaj ĝi povas signifi "faru tion, kion vi deziras, sed bonvolu ne ĉe ni" kaj tia "ĉe ni" povas rilati, laŭ la diversaj situacioj, al nia familio, nia aĝogrupo, nia socia tavolo, nia urbo, nia lando. Kompreneble, la rezulto de tia interpreto povas iri de kompleta indiferenteco ĝis la ekstremo — mi konfesas, nome etna kaj similaj disdividoj.

Ĉiukaze, mi diras jam nun, ke mi ne ŝatas la vorton *toleremo*, aŭ pli precize, la vorton *toleri*. Ĉar ĝi implicas, ke iu superulo pretas permesi al iu alia kun malmultaj rajtoj ion fari, fari ĝin malgraŭe. *Toleremo* laŭ mi ĉiam dividas homojn en du kategoriojn, kaj tio neniam estas bona starpunkto.



ANNA RACHON

Do mi fakte parolas ne pri toleremo sed pli pri agnosko ke ĉiuj, ili kaj mi, havas la rajton esti ni mem, kaj ankaŭ havi tiun rajton kie ajn ni estas. Kaj tio do signifas ne nur permesi, toleri, ke aliaj individuaj homoj aŭ popoloj estu diversaj, sed multe pli bone, ke ili estu akceptataj kiel individuoj kaj specifaj grupoj, ne malgraŭ sia malsimileco, sed tute sendepende de ĝi. Ke ni estos respektataj kaj akceptataj, ĉar ni estas homoj kaj por tio, kion ni povas oferti al nia plej proksima rondo aŭ al la ĝenerala socio, kaj tute ne laŭ la etikadoj, kiuj povus pendi sur ni, koncerne religion, politikan kredon, seksan inklinton, rason aŭ etnon, aĝon, sekson ktp ktp.

Tio do, tuj prezentas la problemon de limoj — mi tre klare scias, kaj tio estas la ĉefa temo de tiu ĉi teksto — mi ne forgesas.

Oni povus certe krei leĝojn, kiam temas pri justeco, sed ne kiam oni parolas pri toleremo en la senco de vera respekto, kiel mi ĝin komprenas. Oni povas verki leĝojn, kiuj klare diferencigos inter leĝaj kaj kontraŭleĝaj kondutoj aŭ agoj, sed oni ne povas same fari pri veraj *homaj* rilatoj, kiam ni transiras la kampon de simplaj rajtoj kaj eniras tiun de vera kunlaboro kaj kunvivo inter la homoj. Kaj tion oni povas atingi nur pere de edukado por paco, por ambaŭflanka respekto, por — resumo — la tuta homaro, ĉar kvankam la raso, religio (aŭ manko de ĝi), kulturoj, seksa orientiĝo ktp ĉiam estos diversaj, ni, la homoj, daŭre estas egalaj. Kaj en tiu momento la temo pri limoj jam preskaŭ disfalas, ĉar ĝi ne plu estas tio, kio bezonas emfazon.

Ni esperu, ke socion tian ni iam sukcesos krei, sed intertempe, ni konscie klopodu ĝin sukcesigi. □

Tiu ĉi teksto estis verkita kiel skriba tasko por ekzameno de ILEI/UEA.

Ĉiutage li venis al la kampo, dormis tie ĝis la vespero, kaj poste revenis hejmen. La maizo kulturigis rapide. La plantoj iĝis grandaj kaj belaj.

Unu tagon, Testudo estis malsana kaj ne povis iri al la kampo. Tial li petis al siaj infanoj, ke ili iru tien — sed ke ili ne devas resti longe tie.

Ĉiuj liaj infanoj iris al la kampo. Kiam ili ekdeziris reveni hejmen, unu el ili diris: "Kiel bone la maizo aspektas. Plaĉus al mi preni unu el ili kaj manĝi el ĝi, eĉ nekuiritan." Ĉiuj aliaj konsentis, ke ili prenu maizon — nur po unu maizo por ĉiu.

Dum ili ekprenis, voĉo demandis: "Kiu estas ĉi tie?" Timigite, unu el ili respondis: "Estas ni — la infanoj de Testudo." La voĉo demandis plue: "Kion vi faras?" Alia infano respondis "Ni prenas maizon."

Estis silento dum kelkaj minutoj kaj poste la voĉo diris: "La infanoj de Testudo prenas maizon — ni iru kaj helpu ilin preni sian maizon." Subite venis multaj feoj\* kun iloj en la manoj. Senvorte, ili tranĉis ĉiun maizplanton. Ili tranĉis la maizojn, kiuj ne jam maturis, kaj tiujn, kiuj jam maturis. Bedaŭrinde, nur kelkaj estis jam maturaj.

Plorante, la infanoj iris hejmen por raporti al siaj gepatroj, ke iuj fordetrui\* la kampon.

Testudo rapidis al la kampo kaj tio, kion li vidis, teruris lin. Li ekploris, batante al si la kapon per la manoj. Kiam la feoj aŭdis la sonon de la trapoj, ili demandis: "Kiu estas ĉi tie?" Testudo respondis: "Estas mi, Testudo." Ili demandis plue: "Kion vi faras?" Testudo respondis: "Mi bategas min, ĉar iuj detruis mian

kampon." Estis silento dum kelkaj minutoj kaj poste, la voĉo diris: "Testudo bategas sin ĉar iuj detruis lian kampon." Ĉiuj feoj venis al la kampo de Testudo kaj ekbategis lin. Li ploregis sed ili ne estis kompatemaj. La leĝo de ilia lando diris, ke kion ajn ili komencis, ili devas fini je kiu ajn kosto. Ili senĉese bategadis Testudon ĝis morto. □

**detrui:** malkonstrui, malfari per forto

**feo:** imagita estaĵo kun supernaturaj povoj

**maizo:** amerika longa greno kun multegaj flavaj eroj ĉirkaŭ si

**matura:** plene kreskinta kaj manĝebla

**testudo:** besto kvarpieda kovrita per ekstera malmolaĵo

**spirito:** superhoma senkorpa estaĵo



# Propagando bezonas propagandon

— May Bijleveld, Brazilo

**C**ar nun mi estas iomete maljuna, preskaŭ 86-jara, mi kredas, ke estas mia devo rakonti al vi kelkajn spertojn, kiujn mi ricevis, kiam mi estis juna. Eble vi diros, ke nun la mondo ne plu estas tia, kia antaŭ 70 jaroj — sed multo ankoraŭ validas.

Estis en la jaro 1931 aŭ 1932. Mi loĝis en Hago, Nederlando. Tie ni havis fortan movadon, sub la reĝo de s-ino Isbrücker, kiel prezidantino de la nederlanda asocio L.E.E.N. (La Estonto Estas Nia). En tiu tempo Andreo Cseh loĝis en Hago. Li, la fama instruisto, kiu ĝojigis ĉiujn lernantojn, ege helpis la lokan Movadon. Ofte oni organizis varbkunvenon, kie li, post prelego de iu nederlandano, donis provlecionon. Tiu eta monstro de lia instruaro allogis multajn, kiuj, en la fino de la kunveno, tuj enskribiĝis por kurso.

Unu tago s-ino Isbrücker diris al mi: "Tie ĉi la Movado estas forta, sed en Delfto ne ekzistas esperantistoj. Ni devas fari propagandon tie. Ĉu vi povus iri al Delfto por vidi, ĉu tie oni povos organizi prelegon kun provleciono?"

En tiu tempo mi estis libera kaj promesis fari mian eblon. Mi prenis tiun sugeston kiel ordonon kaj pripensis, kion fari: rezervi salomon por tiu evento kaj antaŭ tio reklami la prelegon kaj provlecionon. Do, interesi la gravulojn en Delfto.

Delfto estas malgranda, sed grava urbo proksime al Hago. Do, mi metis mian biciklon sur la trajnon por viziti tiujn gravulojn dum multaj tagoj.

Unue mi iris al la redaktejoj de la lokaj periodaĵoj. Poste al la direktoroj de multaj lernejoj, al la rektoro de la Teknika Altlernejo, al protestantaj kaj katolikaj pastroj kaj al la rabeno, al la direktoroj de la grandaj fabrikoj, al la ĉefo de la polico kaj al turismaj agentejoj.

Al ĉiuj mi klopodis paroli laŭ ilia vidpunkto. Al la pastroj mi parolis pri homaranismo. Al la rabeno mi rakontis, ke Zamenhof estis judo. Al la fabrikestroj mi diris, ke per Esperanto ilia merkato

povos plivastiĝi. Al la polico, ke kelkaj banditoj fuĝas al eksterlando, do ili devos kunlabori kun alilandaj policanoj; al la instruistoj, ke Esperanto ankaŭ havas propedeŭtikan valoron; al la turistoj, ke ili povos fari verajn amikojn dum siaj vojaĝoj, eĉ trovi gastigantojn. Al la ĵurnalistoj mi petis verki artikolon. Al ĉiu mi proponis aliĝi al Rekomenda Komitato. Ili konsentis. Finfine mi vizitis la urbestron kaj petis lin esti la Honora Prezidanto de la Rekomenda Komitato. Li konsentis.

Tiam mi demandis s-inon Isbrücker, kiam estos por ili la plej oportuna dato. Kun tiu certeco mi iris al la plej granda salono en Delfto kaj rezervis ĝin por tiu dato. Poste mi presigis afiŝon anoncanta la prelegon kaj provlecionon kaj publikigis sur ĝi la tutan Rekomendan Komitaton. Kun tiuj afiŝoj mi reiris al ĉiuj komitatanoj, petante, ke ili metu tiun afiŝon en bone videblan lokon en siaj lernejoj, preĝejoj, sinagogoj, fabrikoj, redaktejoj, ankaŭ en librovendejoj. Al la ĵurnalistoj mi petis, ke ili anoncu la kunvenon. Ili faris tion.

Preta estis mia tasko.

En Hago mi montris miajn afiŝojn al s-ino Isbrücker. Ŝi terurigis kaj reagis: "May, kion vi faris? Tio estas la plej granda salono en Delfto... tio estos fiasko! Estas multe pli bone havi malgrandan salomon plena ol grandan salomon malplena!"

"Sinjorino Isbrücker, mi tre bedaŭras, sed nun ni ne plu povas ŝanĝi tion. La salono estas rezervita, la afiŝoj disvastigitaj." Do tre kontraŭvole ŝi devis akcepti la aferon.

Je la tago de la evento mi estis kun alta febro, enlite. Mia patrio ne permesis al mi eliri. Sed mia patro iris al Delfto. Kiam li revenis mi demandis, kia estis la kunveno.

"Bonega, tre interesa. Ĉiuj ŝatis ĝin."

"Kaj ĉu la salono estis malplena?"


"Tute ne, ne estis sufiĉe da seĝoj. Multaj personoj devis stari en la koridoroj!"

Aliĝis pli ol 100 personoj al tiu kurso... Sed nun estas eĉ ne unu UEA-delegito en Delfto. Ĉu tiu tuta laboro perdiĝis? □

# Je ekzameno sen timotremo

**Laco, manko de koncentriĝo, nervoziĝemo estas nur kelkaj el la malfacilaĵoj, kiuj aperas dum tempo de ekzamenoj. Ĉu eblas helpi la gestudentojn superi ilin?**

**I**talaj esploris la zorgojn, kiujn havas gestudentoj en la tuta mondo. Sciencisto pri nutraĵoj Massimo Pandiani diras, ke ĉion tion oni povas ordigi per regula nutrado — studento devas regule nutradi sin dum la tuta jaro.



Kio helpas pli bonan pensadon? Ĉu estas ĝuste, ke la cerbo bezonas sukerojn?

— Tio dependas de multaj aferoj — diras Massimo Pandiani. — Simplaj rafinitaj sukeroj tre rapide brulas en la organismo, ili nur malfortigas la koncentriĝopovon. Kompleksaj sukeroj, kiujn oni povas trovi en pastoj kaj rizo, mall rapide absorbiĝas kaj donas konstantan energion al la organismo.

La unua regulo de studenta nutrado estas simpla: ne manĝu rapide kaj ne trinku kafon. Manĝu malrapide kaj kompletajn porciojn.

Plej bone estas manĝi legomojn kaj freŝajn fruktojn, abundajn je vitaminoj kaj mineraloj. Estas bonaj ankaŭ fiŝoj, sengrasaj viandoj, pastoj kaj cerealoj. Estas grave, ke la porcioj ne estu tro abundaj kaj ke la manĝaĵo estu sengrasa, ke la stomako ne ŝarĝigu multe.

Anstataŭ dolĉaĵoj, dum la lernado estas pli bone mordeti semojn de sunfloro, riĉaj je vitaminoj B kaj E kaj je mineraloj, kiel ekzemple zinko. El fruktoj la plej bonaj estas abrikotoj, riĉaj je fero, sekigitaj fruktoj kaj keksoj faritaj el sojo.

Anstataŭ kafo estas pli bone trinki jogurton aŭ iomete da biero.

**Esperantigis Zoran Ćirić, Serbio**



## Ĉapelilo 1.0

Komerce pretigita tekstoprilarborilo por Esperanto sur IBM-kongruaj komputiloj ekde Vindozo 3.0. Helpsisistemo kaj manipulado pure en Esperanto. Ankaŭ por novuloj facilege majstrebla. Esperantaj kaj nacilingvaj signoj sur ekrano kaj printilo. Skaleblaj tiparoj por ĉiuj aplikoj. Ĉiuj necesaj funkcioj por alloge aranĝi vian tekston. Literumad-kontrolilo baze de redakteblaj vortaroj kun pli ol 120 000 vortoj. Disadresada funkcio. Importo kaj eksporto per diversaj formatoj por interŝanĝo. Grafikaĵoj integreblaj.

Enkonduka prezo nur 200 germ. markoj plus ekspedo. — Tuj menu! Esperanto parolata!

Tel: +49-6081-66722, faksilo: +49-6081-3955, reto: 100103.24@compuserve.com  
Professional Consulting, s-ro PEJNO Simono, Am Füllgarten 4, DE-61250 Usingen





Tiu ĉi tradicia animistino de Disney-studioj perfektigas flugantan planko-tukon per sia komputilo. Ĉi-fone, sceno de Aladino. Sube, Reĝo Leono (centre) kaj Belulino kaj la Besto (dekstre).

# La novaj Disney-filmoj

— Irina Aleksejeva, Rusio

facila


© THE WALT DISNEY COMPANY

**Ĉu vi ŝatas rigardi la Disney-produktaĵojn? Verŝajne multaj respondos jese. Sed... kial la Disney-filmoj kor-tuŝas pli kaj pli da rigardantoj kaj enspezigas milionojn ĉiu-jare?**


Jam kelkajn jarojn estas malfacile al mi imagi la vivon sen la animataj\* Disney-filmoj. Preskaŭ ĉiujare aperas tre bonaj filmoj belkoloraj. Mia unua konatiĝo kun tiuj filmoj okazis kun la dufoje Oskar\*-premiita *La marvirineto* (angle *The Little Mermaid*). Kvankam mi estis jam 17-jara, la filmo lasis grandan senton de io luma. Poste mi komencis serĉi ĉiujn filmojn de la Disney-studioj\*, ĉar bedaŭrinde estis maleble rigardi ilin dum la infanaĝo.

Laŭ miaj informoj, komence de 1991 la studioj komencis fari eĉ pli belajn filmojn ol antaŭe. La unua de tiu generacio\* estis *Belulino kaj la Besto* (*Beauty and the Beast*). Preskaŭ la tutan vivon ni konis tiun ĉi fabelon\*. Kelkaj legis ĝin, aliaj aŭdis ĝin de siaj gepatroj. Rusoj havas sian version\* de tiu fama fabelo, konatan kiel *Skarlata\* floreto*. Jen la Disney-studioj prenis tre faman historion kaj utiligante la plej modernajn komputilajn rimedojn faris filmon kun belega muziko. Rigardante tiujn ĉi filmojn oni povas forgesi, ke ĉiuj herooj\* estas pentritaj — eĉ se kandelo\*-ingo kantas kaj teleroj dancas.

Verdire mi ne atendis de Disney ankoraŭ pli bonan filmon, sed venis la jaro 1992 kaj aperis *Aladino*. Denove temas pri tre fama fabelo, orienta ĉi-foje, kiu iĝis tre miriga filmo. Mi vidis kelkajn versiojn de *Aladino*. La rusa kino havas tre klasikan\*



filmon *Lampo de Aladino*, faritan kun precize orienta vidpunkto, antaŭ multaj jaroj. Estis tre neatendite vidi en la Disney-aĵo novan specon de genio\*. Antaŭe la genio ŝajnis esti simpla plenumanto\* de deziroj, sed en la Disney-versio ĝi montras elpensemon kaj elturniĝemon. Dum la tuta filmo eblas aŭskulti bonegajn kantojn. La filmoj de Disney-filmoj ĉiam elstaras pro belega muziko.



Laste mi rigardis la plej freŝan produktaĵon de Disney. Jes, mi parolas pri *Reĝo Leono\** (*The Lion King*). Antaŭe mi tre multe legis kaj aŭdis pri la filmo. Feliĉe, ke *Reĝo Leono* ne sen-iluziigis\* min. Povas ŝajni, ke temas pri simpla fabelo pri amo, amikeco. Sed konsentu, ke vidi homajn rilatojn plenumatajn de bestoj ne estas ordinare. Ankaŭ la mirinda muziko kaj kantado de Elton John eniras nian koron.

Sendube nova filmo de Disney-studioj estos unu el la elstaraj kinaĵoj de tiu ĉi jaro. Mi nur volus scii, kion ili nun preparas! Ion mi tamen jam scias, kaj pro tio antaŭĝojas: la malbonuloj estos nepre punataj. □

**animi:** vivigi  
**fabelo:** rakonto pri mirindaj travivaĵoj de personoj kun supernaturaj kapabloj  
**generacio:** samtemp-anaro  
**genio:** diaĵo, kiu zorgas pri la estonto bona aŭ malbona de ĉiu homo  
**heroo:** ĉefa persono de iu verko  
**iluziigi:** kredigi, ke io neekzistanta estas vera  
**kandelo:** lumigilo, ordinare el besta graso

**klasika:** tradicia; baza  
**leono:** granda afrika kat-besto; la viro portas densan kolhararon  
**Oskaro:** plej grava usona kin-premio  
**plenumi:** efektiviigi  
**skarlata:** brilega sangoruĝa koloro  
**studio:** film-laborejo  
**verso:** prezento de io, farita el aparta vidpunkto



# Preskaŭ fratoj

tre  
facila

— Joĉjo Truong, Usono

Mi sen-pacience\* atendis en la flughaveno\*. Mi relegis lian leteron:

“Kara Tomĉjo,

Mi alvenos ĉirkaŭ la 13-a horo ĉe la Internacia Flughaveno sabate. Mi tre ĝojas, ke mi fine povos ekvidi vin! Estas nekredible, ke mi vidos vin post preskaŭ dek jaroj! Vi estas unu el miaj plej bonaj amikoj. Ĝis!

Kore via,  
Vilĉjo”

Mi korespondis\* kun Vilĉjo dum multaj jaroj. Tamen, mi neniam vidis lin. Mi ĉiam sendis al li fotojn de mi, mia fratino Katjo (kiu havas nur 8 jarojn), mia familio, eĉ mia katido Berto. Sed li sendis al mi nur unu foton — kaj ĝi estis foto de lia urbo!

Mi ne tute komprenas, kial li neniam sendas al mi fotojn. Iam mi petis Vilĉjon priskribi sin mem. Li nur diris “Mi estas alta, havas brunajn\* harojn\* kaj miaj amikoj diras, ke mi estas afabla\*!” Mi sciis, ke li estas afabla, kompreneble. Se li ne estus afabla, kial mi skribus al li?

Ni havas la samajn ŝat-okupojn. La samaj manĝaĵoj plaĉas al ni (ni amas glaciaĵojn\*, tamen malamegas ovojn\*!). Ni havas preskaŭ la saman vivon. Mi povus eĉ diri, ke ni estas preskaŭ fratoj.

Sed mi maltrankviliĝis. Mi demandis miajn gepatrojn. “Ĉu vi pensas, ke mi estas tro grasa\*? Ĉu li ridegos je mi, ĉar mi estas malalta? Eble ruĝharuloj ne plaĉas al li kaj li ne parolos al mi...”

“Silentu! Vi estas nek malalta nek grasa! Krome, vi kaj Vilĉjo estas amikoj; li sendube parolos kun vi. Mi certas, ke li eĉ ŝercos\* kaj ridos kun vi! Vi certe gaje pasigos la tempon!” mia patrino diris.

“Mi esperas, ke li estas belega, forta, alta kaj brava\*!” Katjo diris.

“Katjo, Vilĉjo estas amiko mia, ne via!” mi respondis malkontente.



**afabla:** bonvola

**babili:** multe kaj supraĵe paroli pri negravaĵoj

**brava:** brila; sperta; pova

**bruna:** koloro de tero

**glaciaĵo:** tre malvarma dolĉaĵo

**grasa:** dika

**haro:** maldikega elkreskaĵo sur besto aŭ homo

**haveno:** restadejo, antaŭe nur por ŝipoj

**korespondi:** interleteri

**ovo:** birdoj naskiĝas de ovoj

**pacience:** pace, atendopove

**ŝerci:** diri aŭ fari ion por ridigi

## Rezulto de la konkurso DAMTABULO.

Ni ĝojas anonci, ke la konkurson *Damtabulo* de *KONTAKTO* 145 (1995:1) partoprenis entute 10 homoj, po 1 el Aŭstralio, Bjelorusio, Britio, Hispanio, Kroatio, Malto, Svedio, kaj 3 el Germanio. Gratulon al ili ĉiuj, kiuj trafe solvis tiun ĉi malfacilan enigmon! Lotume venkis **FREDRIK OLOFSSON** el Svedio, por kiu bela libro jam survojas.

L	A	F	R	I	D	O	D	E	L	A	H	O		
M	O	J	L	I	N	N	E	S	K	U	A	S		
Ĉ	A	R	G	R	A	N	D	E	K	S	T	A	Z	E
L	I	A	B	R	U	S	T	O	G	U	A	S	L	
A	F	R	I	D	A	N	A	M	O	N	D	E		
L	A	S	T	E	L	O	J	F	O	R	A	J		

La verkisto estas Ĝeraldo Mattos kaj la verko estas *Arĉoj*.



## Ĉu *KONTAKTO* plaĉas al vi?

Se jes, ne kontentiĝu legi la ekzempleron de via klubo aŭ instruisto — abonu ĝin mem! Se vi estas kursgvidanto, faru kolektivan abonon kun 20% rabato por via lernantaro (sufiĉas nur 6 ricevantoj). Se ni sendas ĉiujn ekzemplerojn en unu pako al unu adreso, la rabato estas 40%! Kaj, se temas pri grandaj grupoj, ni povas interkonsenti eĉ pri pli favoraj rabatoj! Skribu al ni!

### ABONTARIFO 1996

Aŭstralio 31 dolaroj  
Aŭstrio 245 ŝilingoj  
Belgio 765 frankoj  
Brazilo 20 guldenoj  
Britio 16 pundoj  
Danio 150 kronoj  
Finnlando 115 markoj

Francio 125 frankoj  
Germanio 37 markoj  
Hispanio 2300 pesetoj  
Israelo 32 guldenoj  
Italio 34000 lirej  
Japanio 2880 enoj  
Kanado 31 dolaroj

Nederlando 41 guldenoj  
Norvegio 150 kronoj  
Pollando 20 guldenoj  
Portugallio 2500 eskudoj  
Svedio 185 kronoj  
Svislando 31 frankoj  
Usono 23 dolaroj





Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso. La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

Monstroj

Kiel espereble multaj aliaj (krom tiuj, kiuj kutime nur paĝoturnas), mi legis la artikolon "Monstroj ĉirkaŭas vin" (KONTAKTO 146, 1995:2). Kiam oni kelkfoje kontemplas, kiom da mensdifektitoj ekzistas en la Movado, mi nur ĉiam denove feliĉas, ke mi neniam vere apartenis al ili! Sed koncerne la rimedojn menciitajn en la teksto por purigi la socion, ankaŭ mi havas etan kontribuon. Kial oni ne kastru aŭ forgasumu inat Terzi? La unua propono ofte plej utilas.

P. Prögel, Germanio

Organizaj problemoj 1

Tre trafaj la aludoj pri Volapuko, Schleyer, Ido, Couturat kaj de Beaufront en la enigmo Organizaj problemoj (KONTAKTO 147, 1995:3)! Eble aliajn aludojn mi ne komprenis.

Mi gratulas vin pro la kvalito de KONTAKTO kun ĝiaj diversaj kaj interesaj artikoloj. Ĝi daŭre estu malfermita fenestro al la mondo!

Stéphane Lelaure, Francio

La pensiga ludo estis tre interesa kaj amuza. Dankon al Anna pro ĝi!

Niko Sarmjento, Hispanio

Bonega enigmo!!!

S. Ralf Gion Fröhlich, Svedio

Miajn gratulojn al la aŭtoro de la enigmo Organizaj Problemoj, kiu sendube faris grandan laboron!

Mihail Ŝelestov, Bjelorusio

Certe Anna Löwenstein amuziĝis elpensante la nomojn!

Malcolm Jones, Britio

Organizaj problemoj 2

Estas problemo por la solvo de ĉiuj enigmoj de vi proponitaj: mi ricevas vian revuon kutime dek kvin tagojn antaŭ la limdato.

Foje mi simple ne havas sufiĉan tempon por solvi ilin!

José F. Martín del Pozo, Hispanio

Kun viaj kontribuajoj sendu, se eble, ankaŭ ilustran materialon — tio multe helpas nin! Ĉu vi fotas? Ni ĉiam bezonas bildojn pri gejunuloj kaj bestoj el la tuta mondo. Se vi deziras ricevi la ilustraĵojn, skribu tion sur ilian dorson. KONTAKTO antaŭdankas!

Esperanta panoramo

Ĉu estas necese diri, ke via gazeto estas la plej interesa kaj juneca el la eldonaĵoj de la (kutime enuiga) Esperanta panoramo?

Alessandro Pocaterra, Italio

KONTAKTO estas vaste legata de gejunuloj kaj ĉiam aspektas belege.

Ulrich Matthias, Germanio

Eĉ pli juna

En la recenzo pri la libro de Sabira, MALANTAŬ LA MURO — PUZLEROJ PRI ĈINIO (KONTAKTO n-ro 145, 1995:1) vi diras, ke kiam ŝi vojaĝis je la unua fojo al Ĉinio, ŝi estis 18-jara. Ŝi aĝis nur 16 tiam!

Ave Raĝa, Kipro

Duobla miro

Mi tre miris, ke vi aperigis (KONTAKTO 147, 1995:3) la adreson de la alĝeria aŭtoro post lia artikolo, kiu atentigas, kiom danĝeras esti esperantisto nuntempe en Alĝerio! Mi esperas, ke tio ne kaŭzos al li pli da problemoj: esperantistoj ĉiam stampas, reklamas sur siaj poŝtaĵoj aŭ uzas ne neŭtralajn kovertojn!

Mi atentigas vin, ke se la grafika aspekto de KONTAKTO esta agrabla, ĝi tamen kelkfoje komplikas la legadon, ekzemple sur paĝoj 6-7 de n-ro 147 (1995:3), kaj malfaciligas la fotokopiadon: mi ofte uzas artikolojn kiel bazon de konversacia rondo aŭ dum staĝoj.

Tamen daŭrigu. Kuraĝon!

Renée Triolle, Francio

Red.: Mi estis la unua miri, ricevinte la kontribuajon, ke ĝia aŭtoro petas, ke mi publikigu lian adreson "por ke oni rekte kontaktu lin". Tiam mi konsultis lin letere kaj ricevis denovan aserton, ke mi ja rajtas aperigi lian adreson.

Mi bedaŭras, ke ne ĉiam eblas bone fotokopii, sed principe tiu ne estas la celo. Vi pravas, ke la subo de paĝoj 6-7 de n-ro 147 fuŝiĝis.

facila

Ŝtipo

En la arbaro kuŝis granda malnova ŝtipo\*. Venis avino kun saketo, klinis sin al la ŝtipo kaj iris pluen. Venis du knabinetoj kun korboj, klinis sin al la ŝtipo kaj iris pluen. Venis maljunulo kun sako, ĝemante\* klinis sin al la ŝtipo kaj tren\*-iris pluen.

La tutan tagon venis en la arbaron diversaj homoj, kliniĝis al la ŝtipo kaj iris pluen.

Ek-fieris\* la malnova ŝtipo kaj diris al la arboj:

— Ĉu vi vidas? Eĉ homoj al mi riverencas\*. Venis avino — sin klinis; venis knabinoj — sin klinis; venis maljunulo — sin klinis. Eĉ ne unu homo preterpasis min ne kliniĝinte. Do el inter vi tie ĉi en la arbaro mi estas la plej ĉefa. Kaj ankaŭ vi al mi kliniĝu.

Sed la arboj silente staris ĉirkaŭ ĝi, ĉiu en sia fiera kaj malgaja aŭtuna beleco.

Ekkoleriĝis la malnova ŝtipo kaj ekkriis:


— Kliniĝu al mi! Mi estas via reĝo!

Sed tiam alflugis malgranda rapida birdo. Ĝi sidiĝis sur junan arbon kaj gaje ek-pepis\*:

— Jen, kiel vi disbruas tra la tuta arbaro! Silentu! Nenia reĝo vi estas, sed ordinara malnova ŝtipo. Kaj la homoj tute ne klinas sin al vi, sed serĉas ĉe vi fungojn\*. Tamen, eĉ tiujn oni ja ne trovas, jam delonge ĉiuj estas forŝiritaj

— Valentin Katajev (1897-1986), elrusigis Andrei Kolganov, Uzbekio

- fieri: tro kontenti pro siaj meritoj
fungo: elkreskaĵo kun formo de ĉapelo
ĝemi: esprimi dolorajn sentojn per plendaj sonoj
pepi: birdece eldiri
riverenci: klini sin por ĝentilega saluto
ŝtipo: mallonga, dika kaj peza peco da ligno
treni: tiri post si ion kun malfacilo



"Imagoj pri Afriko: Kontinento de espero aŭ de malespero?" KVARA AFRIKA KONGRESO DE ESPERANTO

28 decembro 1995 – 2 januaro 1996 ĉe Kilimanĝaro en Tanzanio

La kotizo de 620 NLG inkluzivas ses tranoktojn, plenan manĝon dum ses tagoj, la programon kaj tuttagan ekskurson al la Nacia Parko Aruŝa. Diversaj ebloj por postkongresaj ekskursoj: ekzemple 5-taga migrado al Kilimanĝaro (690 NLG) kaj 3-taga tendosafario (620 NLG). Karavana flugo el Amsterdamo, kun ekflugo la 26-an de decembro kaj reflugo la 9-an de januaro, kostas 1980 NLG; eventuale estos aliaj konektaj flugoj el aliaj urboj en Eŭropo, se sufiĉos por tio la nombro de aliĝintoj. Informiĝu ĉe la Centra Oficejo de UEA.

15 KONTAKTO n-ro 148 (1995:4)



*facila*

Vi

Mi fermas la okulojn: vi,  
malfermas la okulojn: vi;  
sur muroj, sur fingroj,  
vi en malpuraĵo.  
Do, tio estas amo.

*Enkela Xhamaj, Albanio*